

Bulgaria **ESPERANTISTO**



**VIVPROGRAMO POR JARDEKOJ**

En nia tuta lando eĉ ne unu kolektivo restas indiferenta al la publika por tutpopola pridiskuto Projekto de Programo de Bulgara Komunista Partio. Ankaŭ la Esperanto-societoj okupiĝas pri tio.

De kie venas la granda intereso al tiu ŝajne interna partia dokumento? Kial ankaŭ la larĝaj ne partiaj amasoj partoprenas la diskutadon?

Tio rezultas el la klara kompreno, ke temas pri la vivo de nia popolo — kiel de la nuna generacio, tiel ankaŭ de la ankoraŭ nenaskitaj generacioj. Kaj kiu ne deziras koni la estontecon dum du-tri jardekoj ĝis la fino de nia dudeka jarcento? Kiu ne deziras vidi, laŭ kiu vojo evoluos la vivo de niaj civitanoj? Simila intereso estas tute natura, ĉar ĉiu bulgaro jam bone komprenis el sia propra vivsperto, ke kio estas enskribita en la programdokumentoj de Bulgara Komunista Partio, tio realiĝas, ordinare kun pluso.

Do, kiuj problemoj estas traktataj en la Projekto de Partia Programo?

La konciza enkonduko de la Programo pritaksas la okdekjaran historion de BKP kaj ligas en unueca tuto la pasinton kaj la estantecon kun la estonto, la senperajn celojn kaj taskojn kun la fina celo, enportas klarecon kaj certecon en la krea agado de la Partio kaj la popolo.

En la unua ĉapitro de la Programo estas traktata la epoko de transiro de kapitalismo al socialismo. En la dua ĉapitro estas montrita la venko de la socialismo en Bulgario.

Plej grava estas la tria ĉapitro, nature ankaŭ plej ampleksa. Ĝi estas titolita: „La konstruo de plenevoluinta socialisma socio — senpera historia tasko de Bulgara Komunista Partio“.

Unue, tiu ĉapitro traktas la taskojn de la Partio en la sfero de ekonomio, socia strukturo kaj altigo de popola bonstato. Dualoke estas metitaj la taskoj en la sfero de la spirita kulturo. Je tria loko staras la taskoj en la sfero de socia gvidado, ŝtatkonstruado kaj plua evoluigo de la socialisma demokratio. Kaj je kvara loko — la taskoj en la sfero de internaciaj rilatoj.

En la kvara ĉapitro estas traktata la gvidrolo de la Partio en la konstruado de alte evoluinta socialisma socio, kaj en la lasta, kvina ĉapitro: „La komunismo — fina celo de Bulgara Komunista Partio“.

La sekvaj linioj el la enkonduko montras plej koncize la esencon de la Programo kaj ĝian praktikan signifon por la popolo:

„La realigo de la jena Programo prezentos grandegan atingajon de la bulgara popolo kaj ĝia Komunista Partio; ĝi transformos Bulgarion en alte evoluinta socialisman landon, prezentos novan kontribuon al plikreskigo de la potenco kaj la altira forto de l'monda socialismo, stimulo kaj ekzemplo por la popoloj, batalantaj kontraŭ subpremado kaj ekspluatado, por libero kaj nacia sendependeco, por paco, demokratio kaj socia progreso en la mondo“.

Nikola Aleksiev. Vivprogramo por jardekoj	1
Pavel Matev. Al la Partio	4
Ivan Vazov. Rakovski	4
A. Kononov. La hejtisto de vagonaro n-ro 71	5
J. Jordanov. La rodopa aglo	6
N. Nikolov. La Semajno de Internacia Amikeco en Sofio . .	8
Bojka Batalaska. Vespero de la Esperanta verkaro en SIA . .	9
N. N. Vigla E-agado de junpioniroj	9
Enjo Daskalov. Tre bone (5)	10
Rajna Arnaudova. Omaĝe al la virino	10
* * * Летни курсове за преподаватели и курсови ръководи- тели по есперанто	11
* * * Seminario „Lingvo kaj kulturo“	13
E. Danilčuk. Aktivecoj de la E-sekcio en Krasnodar . . .	13
* * * El „Turisma kalendaro 1971“ (TEJO)	14
Nikola Vâlkanov. La esperantista movado en la regiono de Burgas	15
Ĥr. M. Volin. Ĝis Obskurovo kaj reire	16
* * * Deziras korespondi. Tra la gazetaro	18

Sur la kovrilpaĝo :

Post la popola venko super la faŝismo (9. IX. 1944) ĉiufланке floras Popola Respubliko Bulgario: ĝi jam estas lando kun digvol-
vita peza industrio, moderna kooperativa agrikulturo, Altnivela
kulturo, arto kaj scienco', riĉaj ripozejoj en montoj kaj ĉe Nigra
Maro, tutpopola bonstato.

*Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv.,
2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio,
Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv.*

*Reklamtarifo: 0,15 lv. por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-
anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.*

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ALBANIO: Inĝ. Cefo Fiko, R. Kongresi Për-
metit 7—11/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco
Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang
P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23
Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Ĉal. 13 Sep-
tembrie 65, Bukaresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Televidenija,
D. 7, kor. 3, kv. 44, Moskva M—449.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.

La Projekto de la Programo de BKP sen troigo estas vere historia dokumento. En ĝi estas konkretigita la marksisma-leninisma teorio kaj ĝia krea aplikado sur bulgara grundo, estas ĝeneraligita nia propra bulgara praktiko, sintezita kaj formulita la ĝenerala linio de la Partio por konstruado de matura socialisma socio.

La Programprojekto, kiu post la tutpopola diskutado estos aprobita de la Deka Partia Kongreso, enkorpiĝas la heroecan historion de BKP — historion de luktoj kaj venkoj, de provizoraj malvenkoj kaj karegaj viktimoj. Ĝi enkorpiĝas la plej bonajn revoluciajn tradiciojn, elforĝitajn en tiuj luktoj. La Projekto enkorpiĝas la sopirojn de la plej bonaj filoj kaj de la plej helaj mensoj de la bulgara nacio — de la naciorevoluciuloj el sub la turka jugo, kiuj revis pri pura kaj sankta popola respubliko, kaj de la batalintoj, kiuj pereis en la kruelaj luktoj kontraŭ la faŝismo.

Kiel ruĝa fadeno en la dokumento estas videbla la ĉefajo, kiu estas senco, enhavo kaj celo de la partia politiko — la zorgo pri la homo, pri la bonhavo de la popolo, pri la senĉesa plialtigo de ĝia materiala kaj kultura bonstato.

La Projekto proklamas la sendiskutan veron, ke la atingitaj de nia lando sukcesoj kaj venkoj estas senpere ligitaj kun la neŝanceblebla bulgara-soveta amikeco kaj kun la komuneco de interesoj de la monda socialisma tendaro.

Per afereca tono la Projekto direktas la atenton al la ĉefajo, traktas la problemojn kaj la taskojn ligitajn kun la konstruado de la lasta kaj plej alta etapo de la socialismo — la etapo de matura socialisma socio. Nome la karakterizado de tiu etapo kaj la formulado de la koncernaj taskoj de la Partio kaj de nia popolo estas objekto de plej multnombraj kaj plej ardaĵ diskutoj.

Gravan lokon en la Programo okupas la problemoj de la sciencetecnika revolucio. Ĉiuj ĉe ni kompenas, ke de la rapida aplikado de ĝiaj atingajoj en la produktado, en la gvidado de la ekonomio kaj de la socio dependas plej grandskale la rapideco de nia antaŭeniĝo.

Ni speciale deziras atentigi niajn legantojn pri la evoluo de l'ekonomiaj kaj spiritaĵ interesoj de la socialisma landoj. Pri tio la lasta ĉapitro de la Programo diras:

„La monda komunista ekonomio, regulata laŭ unueca plano, konstruiĝas laŭgrade per larĝigo kaj profundigo de la integralo de l'socialismaj landoj kaj de ilia plua evoluo survoje al komunismo. Perfektiĝas la internaciaj formoj de organizado de la socia produktado. Formiĝas kaj disvolviĝas la internacia komunisma propraĵo. Samtempe kun tio okazas ĉiam pli intima kaj ĉiufanka **proksimiĝo de la nacioj ĝis ilia plena kunfandiĝo estonte** surbaze de komuneco de iliaj ekonomiaj kaj spiritaĵ interesoj, surbaze de frata amikeco kaj kunlaborado“ (la kursivo apartenas al la dokumento).

Jen kio donas perspektivon ankaŭ al la praktika kaj teoria strebado de la progresemaĵ esperantistoj en la mondo. Ilia internaciismo ne estas kimera, senfrukta. Ilia revo pri „unu granda rondo familia“ ne prezentas nur belan stilan figuron, unu noblan sonĝon. Ilia propagando de internacia neŭtrala lingvo kaj ilia abnegacia pionira agado por praktika elprovado kaj pruvado de la taŭgeco de Esperanto servi la bezonojn de la socio jam nun kaj des pli en la estonto havas solidan teorion bazon. Kaptante tiun idean armilon la esperantistoj povas pli firme sekvi sian malfacilan, sed ne sencelan kaj

senperspektivan vojon al senlaca propaganda, eduka kaj organiza laboro por plimultigo de la atingitaj sukcesoj kaj varbado de novaj adeptoj.

La bulgaraj esperantistoj devas ankoraŭ pli energie konigi tra la mondo la atingaĵojn de nia popolo survoje de socialismo, konigi al la tutmonda esperantistaro la veron pri socialisma Bulgario, pri la praktika agado de la bulgara popolo, pri ĝia firma volo vivi en paco kaj kunlaboro kun ĉiuj popoloj sur la tero sendepende de ilia socia reĝimo aŭ socia strukturo. Tiamaniere per la helpo de Esperanto ni gajnos novajn amikojn de Bulgario, ni altiros milojn kaj milojn da fremdlandaj turistoj, ni interŝanĝos kulturajn riĉaĵojn kun reprezentantoj de aliaj nacioj. Tio estos nobla praktika agado por plifirmigo de amikeco, sekureco kaj kunlaboro en la kadroj de Balkana Duoninsulo, de Eŭropo kaj de la tuta Tero.

*

Nia popolo bone komprenas, ke la vojo al konstruado de matura socio ne estas glata, sen malfacilaĵoj kaj baroj. Sed kiam en la vivo kaj la luktoj de la popoloj por pli hela estonteco mankis malfacilaĵoj?

Per la konscia, entuziasma kaj bone organizita laboro de l'tuta bulgara popolo, la Programo, aprobo de la Deko Kongreso de BKP, fariĝos realaĵo.



Ŝatata jubileulo

Al k-do Podkaminer S. N.
Leningrad K-100, Prosp. K. Marks 70, USSR

Tre kara kaj estimata kamarado kaj amiko Podkaminer,

Okaze de du gravaj datrevenoj en via persona kaj socia vivo kaj precipe en via longjara Esperanto-aktiveco, nome: via 70-jariĝo kaj via 50-jara fruktodona esperantista agado, bonvolu akcepti je la nomo de la bulgara esperantistaro plej varmajn kaj sincerajn gratulojn kaj bondezirojn!

Ni konas vin delonge laŭ via agado en la medioj de la revolucia Esperanto-movado en la periodo post la Unua Mondmilito kiel en SEU, tiel ankaŭ en la internacia laborista Esperanto-movado, pli speciale en IPE (Internacio de Proletaj Esperantistoj).

Ni konas ankaŭ vian ardan partoprenon en la laboro de MEM kiel membro de ĝia Internacia Komitato kaj prezidanto de ĝia Komisiono por Eksteraj Rilatoj.

Ni konas vin kiel vervan esperantistan publiciston, traktatan el akra kaj scienca marksisma-leninisma vidpunkto la fundamentajn problemojn de la esperantista movado.

Ni konas vin ankaŭ kiel intiman amikon de Popola Respubliko Bulgario kaj de la bulgara esperantistaro, kun kiu vin ligas via vizito en Bulgario, viaj kontaktoj kun vico da esperantistoj en pluraj urboj kaj vilaĝoj de nia lando.

Ni kredas, ke vi akceptos niajn bondezi-

ĜOJIGA SCIIGO DE NIA REDAKCIO

Responde al nia alvoko atingi 4000 abonantojn de „Bulgara Esperantisto“ (vidu n-ron 10/1970, paĝo 2) multaj distriktaj komitatoj kaj estraroj de Esperanto-societoj plenumis inde sian esperantistan devon. Bonege respondis ankaŭ la esperantistoj el frata Sovetunio.

Dank' al ĉies penoj ni jam atingis kaj superis la ciferon 4000! Tio igis nin peti aldonan kvanton de papero kaj nun nia organo jam aperas en 5000 ekzempleroj! Do, abonigo al ĝi estas ankoraŭ ebla! Sumojn sendu rekte al: Redakcio de „Bulgara Esperantisto“, bulv. Ĥr. Botev 97, Sofio.

En sekvanta numero de nia revuo ekstaros antaŭ vi nia HONORA VERDA TABULO kun informoj pri la bonaj (kaj malbonaj!) kontribuoj de niaj distriktaj komitatoj kaj apartaj aktiuloj en la lando kaj eksterlando.

Do, ni petas la DK kaj la societajn estrarojn sciigi nin oficiale, perletere, pri bonaj agado kaj rezultoj de apartaj aktiuloj dum la abonkampanjo de „Bulgara Esperantisto“!

La redakcio

rojn al vi pri longa vivo kaj plua rezultoplena agado sur esperantista, porpaca kaj scienca tereno.

Por la CK de BEA
Prezidanto: N. Aleksiev



Lige kun la X Kongreso de Bulgara Komunista Partio

AL LA PARTIO

de Pavel Matev

Oni atingas la venkon
nur en batal' per armil'.
Viaj, partio, sennombraj
venkoj radiu en bril'!

Post la luktado pasinta
regas laborenergi'.
Sed pri la fajraj bataloj
ĉiam memoros ja ni.

Ĉiun marŝvojon nun markas
ŝtona memormonument'.
Vidu: ĉe ĉiu konstruo
staras tombej' en silent'.

Ne, ne fluadis sencele
de la herooj la sang'.
Kiu pereis batale —
festas lin glorie la land'.

Oni atingas la venkon
nur en batal' per armil'.
Viaj herooj sennombraj
kuŝu en glora trankvil'.

Ne por konsol', sed memore —
marŝe iranta falang' —
portas la vivaj la flagon
iam baptitan en sang'.

Kvazaŭ trans baroj iamaj
gvidas ĝi nin kun impet'.
Cedas Rodopi-montaro,
cedas la Dobruĝa-step'.

Tie ĉi grenon abundan
falĉas rikolta maŝin',
tie sondistoj petrolon
serĉas kun fera obstin'.

Kaj de la ŝtono landlima
ĝis nigramara surfac'
ni la feliĉon nun tenas:
vivi kaj krei en pac'!

Ne, ne fluadis sencele
de la herooj la sang'.
Kiu militis por festo —
festas lin glorie la land'.

El bulgara: Asen Grigorov

*Lige kun la 150-jariĝo de la naskiĝo
de l'granda bulgara revoluciulo kaj
patrioto Georgo Rakovski (1821—1867)*

RAKOVSKI

de Ivan Vazov

Revanto aŭdaca, personeco ĉarma,
de tempo obskura fil' vigla, alarma,
Rakovski, vi dormas sub herbo en tomb',
nur kruco vidiĝas falinta pro romp'.
Dormu, ripozadu vi, ĉiam vekanta,
vi, ciklono forta, kaldrono bolanta
sur ia malica, furioza flam'!
Dormu, kiu vekus vin el dormo jam?

La naturo sperta certe tre eraris,
el vi eĉ genion ĝi intencis fari,
tial vian kapon — simila al forn' —
plenigis per flamo, admiro kaj ŝtorm'.
Tamen intervenis demono mistera:
iĝis vi kreaĵo de ekstremo veraj,
kerno de pasioj, galo kaj majest',

animo de nokto, brilo kaj tempest'.
via malam' estis malam' de satano,
via amo estis amo de titano,
amo sen hezito, sen dubo, sen lim',
kiun kiel krucon vi prenis sur vin.
Via flago estis: Libero aŭ Morto,
via sonĝ' — Balkano, la popolo — sorto,
la popol' sub sanga, malhonora jug'.
Via tuta vivo estis reva flug'!

Vi penetris, pala, en estontajn sinojn,
vi vin ŝovis streĉe en pasint-ruinojn
kaj el ili tiris — venka argument' —
gloron de jarcentoj kaj pri nia gent',
pri bravuloj, reĝoj legendojn sorĉelajn
kaj de ŝim' kovritajn antikvajn fabelojn.



Via agl-okulo serĉis kun fervor'
la sennombrajn signojn de bulgara glor',
kaj la tutan mondon dum pratemp' obskura
metis vi sub nian influon kulturen. . .
Ĉu al vi maleblis io? — Via mens'
donis formon, korpon al ĉiu ekpens'.
Al enigmoj mutaj kaj al sfinksoj saĝaj
vi proponis viajn demandojn kuraĝajn.
Histori', mallumo, ordo, temp' envia
ne valoris multe en celado via;
vi ekvolis rompi, ho spirit' senpaca,
revant' malfeliĉa, apostol' senlaca,
nur en hor' la faron de jaroj kvincent'!
Via voĉ' fiera tondris kun akcent'
apud Dâmbovica* kaj rivero Sava**.
Vokis vi: „Libero! Ho, aŭroro rava!“
Kaj per plumo akra kaj per flamparol'
semis vi esperojn en la tutpopol'.

* Dâmbovica — rivero en Rumanio.

** Sava — rivero en Jugoslavio.

En amas' dormanta vi nura sendorma,
vi nura por ĉiuj, ho demono ŝtorma,
laboris, batalis, agitis kun flam'.
Jen saĝul' pensema, tie ribelant' —
arestit' en Stâmbul*, en Balkano estro,
poet' kaj rabanto sub la sama vesto,
liro kaj trumpeto, penso kaj metal' —
ĉion vi fordonis por la grandbatal'!

Nia historio devas pensi bone,
ĉe la senmortantoj, kie vin eksponi.

Mortis vi. La vojo al la muta tomb'
estas herbkovrita kaj dronas en ombr',
kaj restaĵoj viaj putras sen pi-larmoj. . .
Sed la temp' ne fermis, heroo alarma,
la trarompon larĝan, kiun via vol'
en estont' elfosis por nia popol'!

El la bulgara: Stefan Kiraĝiev


* Stâmbul — Istambulo.

101 jaroj ekde la naskiĝo de Lenin

LA HEJTISTO DE VAGONARO N-RO 71

El „Rakontoj pri Lenin“ de A. Kononov

De Razliv, kie la plua restado de Lenin fariĝas danĝera, oni lin translokas en Finnlandon. Ĉi-sube Kononov rakontas, kiel la finna komunisto-lokomotivmaŝinisto Jalava plenumas tiun ĉi taskon. La lokomotivo, per kiu Lenin estis transportita, nun staras konservita ĉe la Finnlanda Fervojstacio en Leningrado. *La Red. de „BE“.*



Nokte, je la unua horo kaj dek minutoj, ĉe fervojstacio Udelnaja apud Petrogrado devis halti vagonaro № 71. Kun la maŝinisto de tiu ĉi vagonaro estis interkonsento: li haltigos la lokomotivon iom pli malproksime ol kutime — je la rando mem de la kajo,

kien ne atingas la lumo de la elektra stratlampo. La hejtisto descendos de la lokomotivo kaj lian lokon okupos Vladimir Iliĉ.

La maŝinisto de vagonaro № 71 neniam vidis Lenin. Sed eĉ se li estus vidinta lin, tuteĝale nun li ne rekonus lin: la barbo de Lenin estis forrazita, la frunto estis kovrita per peruko. Sur la peruko estis nigra kaskedo.

Sed kiam la vagonaro haltis kaj la hejtisto saltis en la mallumo sur la teron, Vladimir Iliĉ tiel certe supreniris la ŝtureton de la lokomotivo, ke la maŝinisto pri nenio demandis — klare estis, ke ĝuste tio estas Lenin.

Nun sur la lokomotivo staris triopo: la maŝinisto, lia helpanto kaj Lenin.

La lokomotivon oni hejtadis per ligno. Vladimir Iliĉ rigardis: la helpanto de la maŝinisto ĵetadis la lignon unue en apartan keston, proksime de

la fajrujo. La ligno sekiĝadis; la helpanto iom post iom ĵetadis ĝin en la fajron kaj ebenigadis la karbon per fera ŝovelilo, por ke ĝi bone brulu.

Vladimir Iliĉ trovis sur la muro najleton, pendigis sian palton, kuspis la manikojn kaj komencis fari la laboron de hejtisto.

Li amasigis la malsekan lignon en la keston, ĵetadis ĝin en la fornon, skuadis per ŝovelilo la brulantajn ŝtipetojn. La maŝinisto dum la tuta tempo turniĝis kaj rigardis mire al Vladimir Iliĉ. Lia helpanto estis tre kontenta: li nun povis ripozi. Li sidigis flanke, de tempo al tempo enspire fumis de sia pipo kaj rigardis al la nova hejtisto.

Tiamaniere ili alveturis fervojstacion Beloostrov. Ĉi tie trapasis la limo. Plue komenciĝis Finnlando.

Oni komencis kontroli la dokumentojn de ĉiuj veturantoj. Traserĉata estis la tuta vagonaro. La maŝinisto

kure malsupreniris laŭ la ŝtupareto, alkuris la unuan vagonon kaj dekroĉis la lokomotivon. Poste venigis ĝin al la akvopumpilo — preni akvon. Sed li prenadis ĝin nerapide. Jam el la stacidomo aŭdiĝis la tria sonsignalo, sed la lokomotivo ankoraŭ staris ĉe la akvopumpilo.

Al la maŝinisto kuris, anhelante, la ĉefa kondukto kaj montris sian fajfilon: la vagonaro devas tuj forveturi! Tiam la maŝinisto rapide proksimiĝis al la vagonaro kaj kunigis la lokomotivon.

La ĉefa kondukto ekfajfis.

Je la stacidomo staris oficiro kaj rigardis la maŝiniston. Kaj ŝajne li ion konsideris — jen svingis al iu per mano. Al la lokomotivo ekkuris soldatoj . . .

Sed ĝi jam flugis antaŭen.

El la rusa: Liljana Moralieva

LA RODOPA AGLO

Se Diĉo Petrov estus viva, li aĝus jam duonjarcenton. Li naskiĝis je la 16. XI. 1919 en la bela rodopa vilaĝeto Progled, distrikto de Smoljan. Lia patro estis malriĉa vilaĝano, kiu kun peno nutris siajn infanojn. Fininte la elementan lernejon en sia naskiĝloko, Diĉo kune kun sia kuzo Dimitr Manolev enskribiĝis en la mezlernejo de vilaĝo Ĉepelare, ĝis kie oni devis marŝi horon kaj duonon. Dum tri jaroj la du kuzoj ĉiutage piediris ĝis Ĉepelare kaj reen kaj tiel fortigis siajn junajn korpojn.

En 1932 Diĉo finas la lernejon en Ĉepelare kaj eniras la pedagogian lernejon en Ŝumen. Li multe ŝatas kaj legas la verkojn de Botev. Tie unuafoje li konatiĝas ankaŭ kun la marksisma-leninisma literaturo. Fortan inklinon li havas al la muziko kaj lernas bone ludi violonon, kiu poste daŭre akompanas lin dum lia vivo.

En 1937 Diĉo finas la lernejon kaj estas oficigita kiel instruisto en vil. Sokolovci, distrikto de Smoljan. Tamen pro lia politika agado inter la loĝantaro li estas eksigita. La sekvantan jaron Diĉo eklaboras en la segejo de sia onklo, kiu ekspluatas fremdan laboron. Pro tio li ne restas longe en la segejo kaj la saman jaron estiĝas instruisto en vil. Sârnica, distrikto de Smoljan. En 1940 li estas vokita antaŭ militserva komisiono, kiu decidas sendi lin en la militlernejon por rezervaj oficiroj. Diĉo ne deziras estiĝi faŝisma oficiro, tamen lia amiko kaj saĝa partia funkciulo Georgi Kostovski klarigas al li, ke kiel oficiro li povas esti tre utila al la Komunista Partio. En la militlernejo li studas la militarton, post 10 monatoj ricevas respektivan militrangon kaj iras servi kaj praktiki en Sliven. En la militlernejo li sola lernas ankaŭ Esperanton kaj tiel estiĝas espe-



rantisto. Poste Diĉo estas nomita subleŭtenanto. Pro liaj politikaj konvinkoj kaj proksimiĝo kun la soldatoj oni ofte translokigas lin de unu garnizono al alia ĝis fine en 1942 en vil. Konsko, distrikto de Gevgeli, li ekkomandas memstaran trupon. Tie li disvolvas aktivan kontraŭfaŝisman agadon. Por la pli kleraj soldatoj li organizas kurson de Esperanto, aĉetinte per propraj rimedoj la necesajn lernolibrojn. Tiel for-



miĝas grupo de soldatoj, pretaj sindone servi al la popola afero. Iom poste Diĉo ligiĝas kun la partizanoj, daŭre helpas ilin kaj samtempe preparas siajn soldatojn aliĝi al la partizana armeo. La stabo en Gevgeli ekscias pri la intencoj de Diĉo kaj dezirante aresti lin vokas lin kvazaŭ ofice en Gevgeli. Tamen malfrue! La 25-an de decembro 1943 la soldatoj de 1—15 ĉelima armea subregiono en vil. Konsko,

distrikto de Gevgeli, bruligas sian kazonon kaj ĉefrunte kun sia rotestro Diĉo Petrov kaj kun sia armilaro ekmarŝas la vojon de l'armita kontraŭfaŝisma batalo kune kun la partizanoj. Tiamaniere Diĉo Petrov eternigis sian nomon kiel unua bulgara oficiro aliĝinta kune kun siaj soldatoj al la popola kontraŭfaŝisma kaj revolucia movado.

Komencas sian batalmarŝon la soldata partizana bataliono „Ĥristo Botev“ kun komandanto Diĉo Petrov. La unua batalbapto de la bataliono okazas la 25-an de decembro ĉe atako kontraŭ la nova armea subregiono en vil. Konsko. Sekvas gloraj bataloj kun la faŝisma malamiko. Pro la eminentaj batal sukcesoj de la bataliono la ĉefstabo de la partizana movado en Bulgario per ordeno de la 1-a de majo 1944 distingas la batalionon „Ĥristo Botev“ kiel unuan avangardulan batalionon de la popola armeo. Rapide la bataliono, komandata de Diĉo Petrov, famiĝas kiel nevenkebla.


Pri ĝi oni rakontas legendojn tiel konvinkajn, ke la soldatoj de la korpuso en Makedonio kaj Grekio komencas amase forlasi la kazernojn kaj aliĝi al la popolliberiga movado.

La bataloj kun la malamiko sekvas unu post alia. Tamen la 23-an de majo 1944 en neegala batalo kontraŭ kelk-mila malamika armeo apud vil. Batulija la amata partizana komandanto falas mortigita. Tiel finas sian mallongan, batalriĉan vivon la legenda rodopa aglo, la kuraĝa partizana komandanto — kolonelo Diĉo Petrov. Sed la celo, por kiu li batalis, estas senmorta. Diĉo Petrov eterne vivas en la koroj de ĉiuj bulgaroj.

J. Jordanov

La Prezidantaro de la Parlamento distingis k-don Nano Nanov — prezidanto de la Sofia Esperanto-Societo „Maksim Gorkij“, per ordeno „Popola Libero 1944“ - II grado, pro lia kontraŭfaŝisma batalo kaj aktiva socia kaj Esperanta agado.

Tutkoran gratulon al k-do Nanov!



Amikeco trans limoj

LA SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO EN SOFIO

La Semajno de Internacia Amikeco ekde sia komenco antaŭ tri jaroj estas ĉiam bone aranĝata en Sofio. La Distrikta Esperanto-Komitato en speciala kunsido diskutis la cirkuleran leteron de Bulgara Esperantista Asocio kaj planis sian agadon.

La Urba Esperanto-societo „Maksim Gorkij“ kaj la Poŝtista Esperanto-societo „Heroldo“ dediĉis po du kunvenoj al la Semajno. Post prelegoj oni legis ricevitaĵojn aŭ sendotajn al eksterlandaj leterojn.

La Instruista Esperanto-societo „Diĉo Petrov“ kaj la Studenta Esperanto-societo „Vela Peeva“ aranĝis en la Sofia Universitato tradician vesperon, dediĉitan al la originala kaj tradukita Esperanto-poezio kaj prozo de bulgaraj kaj alilandaj verkistoj. Ĉeestis ĉirkaŭ 100 personoj.

La Urba Komitato por Paco, la Bulgara Sekcio de Mondpaca Esperantista Movado kaj la Distrikta Esperanto-komitato aranĝis grandan tuturban kunvenon en teatra salono je temo „La amikeco inter la popoloj, la batalo por defendo de la paco kaj kontraŭ la milito en Vjetnamio“. Verve kaj elokvente oratoris k-doj Georgi Pirinski—prezidanto de la Nacia Komitato por Defendo de la Paco, kaj k-do Nikola Aleksiev—prezidanto de MEM kaj de Bulgara Esperantista Asocio. K-do Aleksiev speciale akcentis la kontribuon de la tutmonda esperantistaro por la interkompreniĝo de la popoloj kaj por ĉesigo de la milito en Hindoĉinio.

La kunveno akceptis telegramojn al la prezidento de Usono Nixon proteste kontraŭ la plivastigo de la usona agreso en Hindoĉinio kaj la nova invado en Laos kaj kontraŭ la malliberigo de la popola heroino Angela Davis en Usono. La artistino el BET Belka Beleva recitis versaĵon de la konata bulgara poetino Paulina Stanĉeva dediĉe al Angela. La kunveno ĉeestis ĉirkaŭ 400 personoj—esperantistoj kaj neesperantistoj.

Radio Sofio informadis pri diversaj aranĝoj en la lando, ligitaj kun la Semajno de Internacia Amikeco. La plej aŭtoritata en Bulgario ĵurnalo „Rabotniĉesko Delo“, organo de la CK de Bulgara Komunista Partio, aperanta en 650 000 ekzempleroj, publikigis artikolon dediĉitan al la Semajno fare de la plumo de Nano Nanov, prezidanto de la ĉefurba E-societo „M. Gorkij“.

N. Nikolov

FINON AL LA USONA AGRESO EN HINDOCINIO!

*Pere de la Usona Ambasado en Bulgario
Al la Prezidento de Usono s-ro Nixon*

Sinjoro Prezidento,

Ni, la urbanoj de Sofio, ĉeestantaj tuturban kunvenon, organizitan de la Urba Komitato por Defendo de la Paco, la Bulgara Sekcio de la Mondpaca Esperantista Movado kaj la Distrikta—Urba Komitato de Bulgara Esperantista Asocio, kun kolero kaj indigno protestas kontraŭ la nova usona agreso en Laos.

Per viaj agresoj kontraŭ la popolo de Laos vi krude malobeis la Ĝenevaj Interkonsentojn de 1954 kaj neglektas ĉian moralon, homan konsciencon kaj ĝenerale akceptitajn militregulojn.

La reklamita de vi persone programo por paca solvo de la problemoj en Vjetnamio montriĝis abomena demagogio kaj masko por daŭrigo kaj plilarĝigo de la milito en Hindoĉinio.

Ni deklaras, ke ni estas solidaraj kun la popoloj de Laos, Vjetnamio kaj Kamboĝo kaj ke ni ne ĉesos doni al ili ĉiuf flankan helpon, ĉar ilia batalo estas ankaŭ nia batalo.

Ni kategorie mallaŭdas viajn novajn minacojn pri provokoj kontraŭ Demokratia Respubliko Vjetnamio.

Ĉesigu la barbarajn krimojn!

Ne forgesu, ke venos tago, kiam vi estos devigita respondi por la naŭziga, malhonesta, kontraŭhoma kaj senmorala milito, kiun vi jam kelkajn jarojn bruligas en tiu regiono de la mondo.

Retiru viajn armeojn, ĉar ne ekzistas armilo, kiu povus venki popolon, decidintan sin-oferi por libereco kaj sendependeco de sia patrolando.

Sofio, 2. III. 1971

De la kunveno



*Pere de la Ambasadoro de Usono en Bulgario
Al Sinjoro Nixon — Prezidento de Usono*

Ni, la sofiaj batalantoj por paco, en tuturba kunveno insistas protestas kontraŭ la muntita akuzo kaj proceso kontraŭ la batalantino por paco kaj amikeco inter la popoloj kaj kontraŭ la rasa diskrimino en Usono Angela Davis.

Tiu ĉi malhonora proceso celas timigi la progresemajn homojn en via lando, kiuj kuraĝe batalas kontraŭ la agresema milito de Usono en Hindoĉinio kaj kontraŭ la helpo, kiun Usono donas al la cionismo.

Ni insistas, ke oni tuj ĉesigu la malhonoran proceson kaj Angela Davis estu liberigita!

Sofio, 2. III. 1971

De la kunveno

VESPERO DE LA ESPERANTA VERKARO EN SIA

La Instruista E-societo „D'ĉo Petrov“ kaj la Studenta E-societo „Vela Peeva“ en Sofio ankaŭ ĉi tiun jaron elektis originalan manieron por festi la Semajnon de Internacia Amikeco: ili organizis Vesperon de la Esperanta Verkaro.

Per konciza inaŭgurparolado malfermis la Vesperon k-ĉo Kunĉo Vălev — instruanto de Esperanto en la Sofia Universitato. Li substrekis, ke la Semajno de Internacia Amikeco estas rekonita kiel grava iniciato de UEA, ke ĝi jam trian fojon vekas la entuziasmon de la bulgaraj esperantistoj, kiuj staras en la unuaj vicoj de la batalantoj por amikeco, por vere homecaj rilatoj inter la popoloj, por daŭra paco. Ili inde plenumas la plej gravan testamenton de Zamenhof — uzi Esperanton por la altaj celoj de paco kaj amikeco sur la tero.

Poste salutis je la nomo de la Esperanta Literatura Rondo en Sofio k-ĉo Miĥail Ĉobanov — Esperanto-verkisto, artisto kaj reĝisoro.

Sekvis legado de interesaj E-verkoj, kiuj donis al ĉiuj la eblecon ĝui la talenton de niaj E-verkistoj.

Legis siajn originalajn verkojn: Ljuba Bojaĝieva — versaĵon „Letero al usona patrino“,

Miĥail Ŝekerĝiev — rakonton „La kverko“, Stefan Kiraĝiev — poemon „Printempa panoramo“, Prodan Prodanov — rakonton „Esperanta akademio“, Miĥail Ĉobanov — rakonton „Serenado“. K-dino Vera Văjarova recitis la versaĵon de Ivan Genov „Kolombo blanka“ — traduko de Zefira Dimitrova, Asen Grigorov — la rakonton „Sonĝo“ de N. Nedelĉeva (nia originala E-verkistino), Kunĉo Vălev — la originalan versaĵon de Asen Grigorov „La lando de Ho Ŝi Min“ kaj „Standardojn ili portas kaptitajn jam de ni“ de l'elstara nuntempa bulgara poeto Pavel Matev, en traduko de A. Grigorov.

La spirito de l'internacia amikeco plialtigis verkojn de eksterlandaj poetoj, recititaj de studentoj kaj lernantoj: „Mi aŭdas paŝojn“ de Elvira Lippe, „Amikeco“ de Salomeja Neris, „Ĉu vi scias, amiko?“ de Konstantin Gusev, „La kanto de l'vivo“ de Abdurahman As-Sabaa.

La Vespero de Esperanta Verkaro, tradicia jam por la Semajno de Internacia Amikeco, plenis la korojn kaj animojn de la ĉeestantoj per altaj sentoj de homamo kaj pacamo, de fiero pri nia lingvo Esperanto kaj pri niaj bulgaraj Esperanto-verkistoj.

Bojka Batalska

VIGLA E-AGADO DE JUNPIONIROJ

Ĉe la junpionira organizaĵo en urbo Dve Mogili distrikto de Ruse delonge funkcias Klubo de Internacia Amikeco. La Esperanto-sekcio de tiu ĉi klubo disvolvas viglan agadon. Dum la kuranta jaro ĝi organizis du E-kursojn por lernantoj el la elementakaj fundamenta lernejoj. En la du grupoj partoprenas 32 lernantoj. Gvidanto estas la instruisto Nejko Nejkov.

La junaj esperantistoj jam aplikas la Internacian Lingvon per praktikaj celoj. Ili korespondas kun lernantoj el Sovetunio, Hungario,

GDR, Schio (Italio), interŝanĝas poŝtmarkojn, bildkartojn, insignojn, librojn, albumojn. Tiamaniere ili gajnas amikojn de nia lando, al kiuj ili rakontas pri niaj ĉiufankaj sukcesoj, pri nia liberama popolo, pri la vivo de la infanoj en PR Bulgario, pri la junpionira organizaĵo. Nun la junaj esperantistoj el urbo Dve Mogili senpacience atendas karajn gastojn el Hungario. Pri ili ni informos per nia amata revuo „Bulgara Esperantisto“.

N. Nejkov

En II Geknaba Politeknika Gimnazio de urbo Pernik funkcias duagrada E-kurso. La lernan-



toj diligente ekposedas la lingvon. Kelkaj jam korespondas kun eksterlando. Plej bonajn rezultojn havas Sneĵana Stojčeva — lernantino el IX klaso (*vidu la foton*). Ŝi jam sufiĉe bone regas la lingvon kaj korespondas kun esperantistoj el Pollando, Ĉeĥoslovakio, Usono.

Nova kurso komenciĝis por lernantoj el VI kaj VII klasoj. Ambaŭ kursoj estas gvidataj de nia fervora samideanino Cvetanka Zareva — juna kaj esperiga instruistino.

OMAGE AL LA VIRINO

La Sofia Esperanto-Societo „Maksim Gorkij“ organizis tradicion kunvenon dediĉitan al la Tago de Virino — la Oka de Marto. Raportis Radka Rajnova — pioniro de la Esperanto-movado en Sofio. En belsona Esperanto ŝi retrospektis la staton de la virino dum la historiaj epokoj. Interese ŝi rakontis pri la longedaŭraj bataloj de la virinoj kontraŭ ekonomiaj kaj politikaj faktoroj por elmiliti sian egalrajtecon kun la viro. La venko postulis multajn viktimojn. Pereis ankaŭ esperantistinoj: Vela Piskova, Penka Miĥajlova, Vela Peeva k. a. Ne vanaj tamen restis la karaj viktimoj. En ĉiuj sferoj de la vivo en nia lando nun brilas la atingajoj de la nuntempa virino. Ankaŭ al la Esperanto-movado aliĝas amaso da virinoj, kiuj fordonas siajn fortojn en la laboro por firmigo de paco kaj amikeco inter la popoloj. Ni fieras, konkludis la raportantino,

Vivu la Bulgara Komunista Partio — saĝa gvidanto de nia popolo al feliĉo, al komunismo, al tutmonda paco!

En Teksa Teknika Lernejo, urbo Vraca, Esperanto estas instruata fakultative jam 11 jarojn. Lernanta societo „Anne Frank“ membras 174 gelernantoj, kiuj 100% estas abonantoj de „Bulgara Esperantisto“.

Finiĝis la unua semestro. La rezultoj estas tre bonaj. Kvin fakultativaj kursoj kun 167 komencantaj esperantistoj obstine kaj diligente lernis la Internacian Lingvon.

Jen la rezultoj:

Pcentoj	2	3	4	5	6	
I-a kurso	—	—	9	18	7	— 34 gelernantoj
I-b kurso	—	2	6	10	12	— 30 „
I-v kurso	—	1	5	8	17	— 31 „
I-g kurso	—	2	10	13	9	— 34 „
I-d kurso	—	3	12	10	13	— 38 „

5 kursoj 8 42 59 58 —167 gelernantoj

La sukceso por la unua semestro estas — TRE BONE (5).

Ĝis nun estas senditaj pli ol 200 leteroj al la tuta mondo. Estas ricevitaj 65 respondoj. La korespondado tre bone helpas al la gelernantoj lerni Esperanton. La malnovaj esperantistoj, la lernantoj Ivan Ĥristov, Mitko Angelov k. a., helpas en la koresponda agado de la multnombraj esperantistoj.

Enjo Daskalov

pri la senlaca Esperanto-agado de samideaninoj Trajana Petkova, Tinka Lakova, Zora Hans, Bogdana Popova kaj multaj aliaj.

La prezidanto de Societo „Maksim Gorkij“ Nano Nanov adresis varmajn salutvortojn al la bulgaraj esperantistinoj agantaj en la kampo de pacbatalo kaj la disvastigo de Esperanto. En tiu solena momento li admiris la heroinon Angela Davis.

La juna kantistino Rosica Janĉeva ĉarmis la publikon per klasikaj kaj popolaj kantoj en Esperanto. La esperantistinojn salutis per bela E-versaĵo la poeto Stefan Kiraĝiev. Nia Esperanto-poetino Ljuba Bojaĝieva, ĉiam aktuala en sia verkado, legis la poemon „Al usona patrino“. Unuakta teatraĵo, interpretita de la artisto paro Belka Beleva kaj Anani Anev, bonhumorigis la ĉeestantojn.

Rajna Arnaudova



БЪЛГАРСКИ ЕСПЕРАНТСКИ СЪЮЗ

Учителска секция * Софийски окръжно-градски комитет ЛЕТНИ КУРСОВЕ ЗА ПРЕПОДАВАТЕЛИ И КУРСОВИ РЪКОВОДИТЕЛИ ПО ЕСПЕРАНТО

Тази година летните есперантски курсове ще се проведат през м. август, както следва:

I степен — за начинаещи — 12—31 август;

II степен — за напреднали — 12—31 август;

III степен — за преподавателска правоспособност — 12—31 август;

IV степен — опреснителен курс — 15—28 август.

Таксата за участие (храна, квартира, учебни помагала, лекторско възнаграждение и др.) — за първите три степени — 60 лв., за IV-та степен — 42 лв.

В курсовете се приемат учители от всички видове и степени учебни заведения, както и младежи с поне средно образование, които желаят да се подготвят за преподаватели и курсови ръководители по езика.

Опреснителният курс е предназначен специално за преподаватели и курсови ръководители, които вече преподават езика.

Като преподаватели в курсовете са привлечени известни наши педагози-есперантисти от страната и чужбина. Методическото ръководство ще се осъществява от д-р Ицван Сердахеи — завеждащ катедрата по есперанто в Будапештския университет.

Курсовете ще се проведат по системата за преподавателска подготовка на кадрите с помощта и под контрола на отдел „Народна просвета“ при Софийския окръжен народен съвет. На всички учители, които разходи за храна, квартира и лекторско възнаграждение ще се поемат от съответните отдели, внесените суми ще бъдат върнати.

Срок за записване и внасяне на

половината от таксата — 15 юни т. г. Втората половина ще се внесе при започване на курсовете.

Молби за записване изпращайте до: Окръжно-градски комитет на Българския есперантски съюз, бул. Хр. Ботев 97, София, а суми изпращайте по сметка 19/2553, ДСК Благоевски район, Окръжно-градски есперантски комитет — София.


Промяната в мястото и сроковете се налага поради възможността курсовете вместо в Годеч да се проведат край морето — в Меден рудник, Бургаско. За точното място допълнително ще съобщим.

XXXI KONGRESO DE HISPANAJ ESPERANTISTOJ

La XXXI Kongreso de hispanaj esperantistoj okazos je la 19—24 de julio j. k. en urbo Alicante. Inter alie: nokta koncerto en kastelo, artaj fajroj en la haveno, subĉiela prezentado de Esperantaj filmoj nokte, ekskursoj k. a.

Por eksterlandaj esperantistoj la partopreno en la kongreso estas senpaga. Ili turnu sin al: s-ro Miguel Manteca, Plaza de los Luceros, 7 Alicante, Hispanio.

E-kurso por progresintoj en Velingrad.
Guidanto Manol Colev.



Ekde oktobro 1970 komencis aperi informa bulgarlingva bulteno „Esperantski vesti“ („Esperantaj Informoj“) — eldonaĵo de Bulgara Esperantista Kooperativo. Krom informoj pri la agado de BEK kaj ties E-komercaĵoj, en ĉiu numero de „Esperantski vesti“ estas abunda informa materialo pri la vivo kaj agado de la esperantistoj en Bulgario kaj eksterlando.

La bulteno estas sendata senpage al ĉiuj regulaj membroj de la Kooperativo. Samtempe oni sendas ĝin al redakcioj de ĵurnaloj, gazetoj, lokaj radioretoj, apartaj soci-agantoj k. a.

Redakta Komitato: Ivan Sarafov, Nikola Nikolov, Jordan Ĉaljevski. Eldonkvanto 1500 ekz., 16—20-paĝa, stencilita. Jam aperis n-roj 1 kaj 2. Ekde 1971 „Esperantski vesti“ aperos kvarfoje dum la jaro.

TRA LA



MONDO

**JUNULARA ESPERANTO-TENDARO SUR
LA BORDO DE DNIPRO**

Dum sia kvinjara ekzistado la Studenta Esperanto-klubo ĉe Komsomola Komitato de Kieva Politeknika Instituto (KPI) fariĝis kerno de agado de la junaj ĉefurbaj esperantistoj. En 1969/1970 ĝiaj aktivuloj gvidis E-kursojn en 5 altlernejoj, post kies sukcesa finiĝo ili transformiĝis en sekciojn de la E-klubo.

La Esperanto-klubo iniciatis aranĝon de somera Esperantista Junulara Tendaro en 1971. Kune kun la komsomola komitato de KPI estis

**DE VI DEPENDAS LA ELLABORO
DE NOVA GRAMOFONDISKO**

La uzino por gramfondiskoj „Balkan“ en Sofio akceptis proponon ellabori novan gramofondiskon kun estradaj kantoj en Esperanto, plenumotaj de la konataj bulgaraj kantistoj Lili Ivanova, Emil Dimitrov kaj solistoj de kanthoro „Planinarska Pesen“ ĉe la Urba Komitato de Bulgara Turista Asocio — Sofio.

Sed la gramofondisko estos preta nur se 1000 bulgaraj esperantistoj deklaras, ke ili aĉetos 1000 gramofondiskojn!

Do, partoprenu amase la kampanjon por plej baldaŭa ellaboro de nova Esperanta gramofondisko! Ĝi kostos nur 1 levo.

Sendu viajn mendojn al adreso: Nova disko, poŝtenska kutija 45, Sofio.

elektita la tendarejo. Ĝi estos unu el la sporttendaroj de KPI „Sosnovij“, situanta apud la urbo sur la dekstra bordo de Dnipro. Rivero, strando, arbaro estos je dispono de la tendaranoj dum dek aŭgustaj tagoj. En la tenda urbeto estas subĉielaj teatro kaj kinejo, manĝejo, multaj sportplacoj, dancplaco, klubo kun televidiloj — unuvorte, ĉio necesa por agrabla kaj fruktodona laboro kaj ripozo.

Antaŭnelonge jam aperis la Unua Bulteno, kiu enhavas priskribojn de Kievo, Politeknika Instituto, sporttendaro „Sosnovij“. Al la partoprenantoj estas proponata riĉa kaj interesa programo. Inter la aranĝoj kiel plej gravaj menciindaj estas scienca kaj pedagogia seminarioj, belartaj vesperoj, fakaj renkontiĝoj. Krome la programo antaŭvidas literaturan kaj oratoran konkursojn, dancvesperojn, turistajn marŝojn, kelkajn komunajn festojn.

En Kievo okazos antaŭtendaro, celanta konatiĝon kun la vidindaĵoj de la ukraina ĉefurbo.

Ĉiujn informojn kaj la Unuan Bultenon kun detala priskribo de la tendaro oni povas ricevi de: **Esperanto-klubo, Kieva Politeknika Instituto, Kiev-56, USSR.**

UEA-KANDIDATIGITA POR PACPREMIO NOBEL

Ankaŭ *Universala Esperanto-Asocio*, la monda organizaĵo por la disvastigo de komuna neŭtrala lingvo, estis kandidatigita por la Pacpremio Nobel. Inter la proponintoj de la Esperanto-Asocio, parlamentanoj kaj kleruloj el multaj landoj, elstaras grupo de 132 membroj de la Sveda Parlamento, konsistanta el membroj de ĉiuj svedaj politikaj partioj. La proponintoj akcentas la rolon de la Internacia Lingvo por pli bona internacia kompreniĝo.

Apud la 132 svedaj parlamentanoj troviĝas 14 membroj de la dana parlamento, same el ĉiuj partioj, kaj grupoj de parlamentanoj kaj aliaj kvalifikitaj personoj en Francujo, Italujo, Britujo, Norvegujo, Usono, Nederlando (37 parlamentanoj el kvin partioj) kaj aliaj landoj. La proponoj parolas pri la jam granda disvastigiteco de la Internacia Lingvo kaj pri la bonfara laboro de Universala Esperanto-Asocio ne nur dum la du mondaj militoj, sed ankaŭ en tempoj de paco por krei amikajn rilatojn inter la popoloj.



Grava iniciato de TEJO

SEMINARIO „LINGVO KAJ KULTURO“

5—12 septembro 1971, Strasburgo, Francio

La lingvaj fenomenoj enkadriĝas en la socia fenomenaro. Lingvo, kiel komunikilo de kulturo, ne povas esti konsiderata kiel unu el ĝiaj plej malgrandaj kaj sensignifaj aspektoj. Male: la kulturo estas transdonata pere de lingvo, eble ĝi devas eĉ submetiĝi al la kondiĉoj, kiujn proponas la lingvo.

Ĉu do lingvo lasas tiam markon ĉe la kultura disvolviĝo? Kiel — kiom kaj kiusence — lingvo kaj kulturo rilatas unu al alia? Interne de grupo kiomgrade la elekto de tiu aŭ alia lingvo gravas por la kultura disvolviĝo de tiu grupo? Kiuj estas la ideologiaj kaj politikaj implicoj de la uzado de diversaj lingvoj?

Al tiuj tre aktualaj demandoj dediĉos sian laboron la seminario „Lingvo kaj Kulturo“, organizata en Strasburgo de NEJO-komisiono de TEJO.

La laboro de la Seminario estos plenumita ĉu pere de enketoj, ĉu pere de prelegoj de fakuloj (lingvistoj, sociologoj), ĉu pere de diskutgrupoj. Verŝajne oni plejparte laboros en ĉi lasta maniero.

Fine oni komune redaktos dokumenton pri la konkludoj de la seminario.

Preparlaboroj por la seminario

1. Memstudo de la problemoj:

- a) en rilato kun eksterlandaj esperantistoj;
- b) ellaboro de propra referaĵo;
- c) persona helpo en kompilo de bibliografio en nacia lingvo.

AKTIVECOJ DE LA ESPERANTO-SEKCIO EN KRASNODAR

Ĉe la Domo de Sciencistoj en urbo Krasnodar, USSR, funkcias Esperanto-sekcio, kiu ĉiujare organizas E-kursojn. Dum la kuranta lernojaro 20 novaj esperantistoj jam finis elementan kurson, kaj nun dua kurso funkcias. La sekcio ĉi-jare aranĝis du E-ekspoziciojn — en septembro kaj januaro. Nun ĝi preparas en Esperanto materialon por ekskursgvidanto tra Krasnodara Regiono.

Adreso: Elizaveta Danilĉuk, 350 000, Krasnodar-Centro, ul. Gogolja 150, Sovetunio.

Sur la foto — de maldekstre dekstren sidas: J. J. Lipkor, I. N. Solovjov, L. V. Malukova, E. N. Danilĉuk (prezidanto de la E-sekcio), M. P. Popov, A. P. Kaĉinov (blinda esperantisto), starantaj: T. V. Ribak, L. G. Ĵidkova, E. K. Homiĉ, F. K. Homiĉ, S. M. Gorodeckij, G. S. Derkaĉov.

2. Kompili liston

de interesiĝantoj kaj kompetentuloj, studentoj aŭ diplomitoj pri psikosociologio, lingvistiko, filozofio.

3. Fondo de studgrupoj

pri la problemoj „Lingvo kaj kulturo“ kaj instigo al verkado de referaĵoj.

La studgrupo povas esti pure esperantista aŭ el esperantistoj kaj neesperantistoj eĉ nur el neesperantistoj, kies referaĵojn oni povus poste traduki.

4. Publikigo de artikoloj

pri la problemoj en Esperanta aŭ nacilingva gazetaro.

5. Organizo de diskutkunvenoj

ĉu nur de esperantistoj, ĉu miksitaj.

Priskribo de la Seminario

Partoprenantoj: internaciaj junularaj organizaĵoj (esperantistaj kaj ne-esperantistaj) kaj individuaj fakuloj kaj interesiĝantoj.

Laborlingvoj: franca, angla kaj Esperanto.

Programo: * Enketo pri la lingva problemoj interne de la ĉeestantaj organizaĵoj kaj de junularaj organizaĵoj ĝenerale.

* Enkondukaj prelegoj pri:

- Lingvo kaj kulturo: lingvistika vidpunkto;
- Lingvo kaj kulturo: sociologia vidpunkto;
- Lingvo kaj kulturo: ideologia vidpunkto.



- * Diskutgrupoj pri la diversaj temoj kaj raportado de la grupaj rezultoj. Oni grupiĝos ĉu laŭ lingvoj (por lingvistikaj diskutoj), ĉu laŭ celoj de propra organizaĵo (por ideologiaj aspektoj).
- * Vizitoj al internaciaj organizaĵoj en Strasburgo kaj studo pri iliaj soci-lingvaj problemoj.
- * Praktika studo pri soci-lingvaj problemoj de ĉeestantaj organizaĵoj.
- * Redaktado de seminariaj konkludoj.

Adreso de la seminario: **TEJO, NEJO-komisiono, Kastelenstraat 231, Amsterdam Z, Nederlando.**

Pliajn informojn bulgaroj povas ricevi de k-dino Batalska — membro de la Estraro de Bulgara Esperanto-Junularo.

Adreso: **Bojka Batalska, str. Brest 6, Sofio.** Oni nepre sendu leteron al ŝi pri ĉiu agado en Bulgario rilate la Seminarion „Lingvo kaj kulturo“.

Esperantistoj-lingvistoj, sociologoj, filozofoj, partoprenu tiun ĉi gravan seminarion! Instigu neesperantistojn-kompetentulojn partopreni, uzante laŭvole unu el la tri lingvoj de la Seminario! Bulgara Esperanto-Junularo prenas sur sin la taskon traduki ĉies referaĵon en Esperanton. La Seminario en Strasburg estas grava iniciato, kiu kontribuos ne nur por ĉiufanka pristudo de la problemoj, sed ankaŭ por penetro de Esperanto en neesperantistajn mediojn. Ni subtenu laŭpove tiun ĉi iniciaton!

TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO (TEJO)

El „Turisma kalendaro 1971“

Prilaborita de Turisma Servo de TEJO. Eldonita de Unuiĝo de Polaj Studentoj — Torun.

9 de aprilo — 6 de majo, urbo Karlovo, Bulgario: **Internacia Literartura Seminario.** Temo: La verkaro de Ivan Vazov, Hristo Botev, la ideologio de Vasil Levski.

Adreso: Bojidar Leonov, Car Asen 7, Karlovo, Bulgario.

1—14 de julio, Pollando: **Perfektigaj Ferio-kursoj de Esperanto.** Programo: esperantologiaj prelegoj, konversaciaj ekzercoj, seminariaj okupoj pri metodiko de E-instruado, E-vesperoj, kun kantoj, kajakaj vizitadoj de pitoreska lagaro, naturĝuado, banado.

Prezo: 800 zlotoj. Adreso: Bydgoszcz, Koszarowa, DS 1, Pollando.

14—21 de julio, Ateno, Grekujo: **Akropolo 71.** Programo: debatoj kun la titolo „Lingva situacio en . . .“, vizitado de Ateno, ĉirkaŭaĵo kaj muzeoj, ekskurso al Mycenae.

Prezo: 1000 draĥmoj (33 us. dol.). Adreso: Junulara Sekcio de Helena Esperanto-Asocio, Agiu Meletiu 54—Athine, T. T. 81.

17—31 de julio, Torun, Pollando: **III Internacia Esperanto-Ferio por mezlernejanoj.** Programo: perfektiga kurso de Esp-to; kiel agi en lernejoj E-rondoj; vizitado de urbo Torun, turistaj ekskursoj, distraĵoj aranĝoj.

Prezo: 700 zl. Limdato por aliĝo: 15.05.1971. Adreso: Studenta Scienca Esperanto-Rondo, Torun, Mickiewiczza 6/10, Pollando.

17—20 de julio, Bjalistoko, Pollando: **La III Kultura Festivalo de Pola Esperanto-Junularo.** Programo: konkursoj — pri pentro-skulpto-grafik-arto, fotoarto, deklamado, E-tradukado, muziko, oratora arto, ekskurso al Bialowieza, balo.

Prezo: 300 zl. al konto PKO Bialystok 12-9-632, Oddz. PZE, Pollando.

21—25 de julio — Torun, Pollando: **La VII Internacia Esperanto-Seminario.** Temo: „Kontribuo de poloj al la monda kulturo“ (en literaturo, muziko, politiko). Distraj programoj: Poezia Vespero, Teatro de unu aktoro, Ballo „Sub la blua antaŭtuko“, ekskurso.

Prezo: 350 zl. sen ekskurso, al la konto: PKO Torun 24-9-224, Studenckie Kolo Naukowe Esperanto.

25—29 de julio, Bydgoszcz, Pollando: **Studenta Renkontiĝo-Seminario.** Temoj: „UNESCO kaj kulturaj, klerigaj kaj lingvaj problemoj de la nuntempa mondo“, „Kiel plivigli la studentan Esp.-movadon“. Amuzaj programoj: koncerto, folkloro vespero, balo, ekskurso.

Prezo: 300 zl. (kun ekskurso — 400 zl.). Adreso: Studenta Esperanto-Rondo, Bydgoszcz, Koszarowa 9, DS 1, Pollando.

28 de julio — 8 de aŭgusto, „Sosnovij“ (bordo de Dnipro), Sovetunio: **Somera Esperantista Junulara Tendaro SEJT.** Programo: belartaj vesperoj, turistaj marŝoj, oratora kaj literatura konkursoj, scienca kaj pedagogia seminarioj.



Ni kreu la historion de nia E-movado!

LA ESPERANTISTA MOVADO EN LA REGIONO DE BURGAS

En Burgas Esperanto aperis unufoje en 1924. La unua Esperanto-kurso estis malfermita en 1925. Inter la kursanoj estis Stefan Stanĉev, Paulina Stanĉeva, Kirjak Konstantinov, Genĉo Genĉev, Aleksandr Canev, Bogdan Brajkov k. a. Dum la sekvantaj jaroj k-do Kirjak Konstantinov gvidis plurajn kursojn, en kiuj Esperanton lernis multaj progresemaĵ junuloj.

En 1926 estis fondita la Esperanto-societo „Nigra Maro“, ĉe kiu funkciis ĥoro, gvidata de la ĥorestro Jablenski. Poste, en 1928, en la klubejo de la Laborista Partio gvidis kursojn de Esperanto Grigor Draganov. En tiuj kursoj Esperanton ellernis multaj kamaradoj, kiuj aktive partoprenis la liberigan batalon de la laborista klaso. Temas pri la kamaradoj Todor Kirov, Ivan Filĉev, Nikola Kirjazov, Nikola Valkanov, Marko Enĉev, Stojan Josifov, Grudi Mavrov kaj m. a. Iom poste Petr Rakanov, partopreninte Esperanto-kursojn, instigis al partopreno ankaŭ multajn gelaboristojn el la ĉapelmetio. Inter ili estis ankaŭ Jovĉo Petkov (Jonkata) mortkondamnita de la faŝisma tribunalo kaj pafmortigita en 1942 en Elĥovo.

Dum 1930 la Esperanto-societo „Nigra Maro“ kreskis. Por eviti la persekutadon de la polico ni elektis kiel prezidanton Dimitr Ĉervenakov, tiam konata komercisto, kiu devis servi kiel

kamufiilo por la konsisto de la societo. Ni kolektiĝadis en la societa klubejo, en la domo de d-ro Patev. Tiutempe oni organizis malgrandan ekspozicion de leteroj kaj poŝtkartoj ricevitaj el eksterlando. La aŭtunon de 1931 ni decidis organizi en la teatro esperantistan spektaklon. Estis preparitaj deklamaĵoj en bulgara lingvo kaj Esperanto, unuakta teatraĵeto kaj kantoj. Ĉar oni devis ricevi permeson de la polico, ni sendis tiucele nian prezidanton Dimitr Ĉervenakov. La poliestro Savov tamen diris al li: „Sinjoro Ĉervenakov, tiuj knabaĉoj, kun kiuj vi treniĝas, ne estas esperantistoj* kaj komunistoj. Ili metos en la kelon de via magazeno iun bombon kaj via tuta havaĵo iros al la diabloj.“ Ekde tiam Ĉervenakov ektimis kaj rifuzis esti prezidanto. Tiam ni elektis kiel prezidanton k-do Kirjak Konstantinov, librotenisto en la loka banko. Dum longaj jaroj, ankaŭ post la 9. IX. 1944, li restis prezidanto de nia Societo.

En 1932 k-do Marko Enĉev malfermis kafejon „Esperanto“ sur strato „Slivnica“ vid-alvide al la nuna turisma oficejo „Rila“. Ni, esperantistoj, komencis kolektiĝi tie, tamen la polico konstante observis nin. Ĉe unu batalmanifestiĝo en septembro 1932 la polico pafis kontraŭ la laboristoj. La sekvan tagon la ŝildo de la kafejo malaperis, poste oni ĝin trovis truita kelkloke per tranĉilo. Post tio k-do Marko Enĉev, la kafejestro, estis arestita de la polico, torturita, kaj la kafejo—fermita.

La esperantista movado en Burgas donis karnajn viktimojn en la kontraŭfaŝisma batalo, kiel ekz. Nikola Botuŝev, Jovĉo Petkov (Jonkata), kiuj estis kruele torturitaj en la polico, kondamnitaj al morto kaj mortpafitaj.

* Remsanoj — membroj de RMS (Laborista Junulara Unuiĝo), t. e. komsomolanoj.

(sekvas sur p. 16)

Amika etoso: esperantistoj el Burgas kun sia kara gasto — d-ro Marton Lajoŝ el Budapeŝto (1970 j.).

Prezo: 30 rb. Limdato por aliĝo: 10 de majo. Adreso: Esperanto-Klubo, Kiev 56, Politeknika Instituto, Ukrainio, Sovetunio.

8—12 de aŭgusto, Kiev, USSR: **Tagoj de Kiev.** Programo: vizitado de urbo Kiev — „Patrino de la rusaj urboj“. „Tagoj de Kiev“ sekvas post SEJT.

Prezo: 5 rb. (sen nutrado). Adreso: la supra.

5—15 de aŭgusto — Edinburgo, Britujo: **27 Internacia Junulara Kongreso de TEJO.**

22—28 de aŭgusto, Belgio: **La 6-a Seminario por gvidantoj.** Detalajn informojn je adreso: H. Baker, Kastelenstraat 231, Amsterdam Z., Nederlando.

5—12 de septembro, Strasburgo, Francio: **Seminario „Lingvo kaj Kulturo“.** Programo: prelegoj kaj diskutoj pri la temo „Lingvo kaj kulturo“. La lingva problemo en junularaj organizaĵoj. Adreso: NEJO-Komisiono de TEJO, Kastelenstraat 231, Amsterdam Z., Nederlando.

Per pliaj informoj rilate ĉiujn suprajn aranĝojn la interesatoj devas turni sin al la donitaj adresoj.



ĜIS OBSKUROVO KAJ REIRE

Memoraĵo el la propra juneco

Ho vi, hajlo terurega! Kiel drako furioza ĝi forglutis la rikolton kaj la esperon vilaĝanan. Ĝuste tiam pliriĉiĝis nia komercisto Koljo, vilaĝana bonfaranto. Vi bezonas grenon, kara? Nu, bonvole vin invitas lia provizejo plena. Iomete multekoste, sed... la tempo estas tia.

Sunsubiro super Jantra. Laŭrivere — kruta vojo. Kiel ĉiam tro malpeza estas ŝarĝo veturila: fojno por la ĉevaleto, avo Dimo kaj sur kofro — pasaĝero.

— Pro kia laboro al nia malbenita Obskurovo, sinjoro?

— Mi estos instruisto tie.

— A-ha, instruisto? Instruistojn mi ege ŝatas. Ja ili okulojn malfermas, popolon klerigas. Estu por ĉiam mia amiko! Ĉu akceptite?

— Mardo! Malbenita tago. Dio vin gardu de interparolo kun instruistaro en mardo.

Tiel koleriĝis la komercisto Koljo, kiam antaŭ liaj ruzaj okuloj aperis ĉi-matene la senbarba sinjoro, kiu volas fariĝi instruisto en la vilaĝo.

Neniu povis diri, kiom pezas la cerbo de nia baj Koljo, kaj ĉu li estas legoscia. Sed oni ĉiam elektis lin en la ko-

misiono, kiu enoficigas la instruistojn. Eble tiel rekompencis lin la sennombraj ŝuldantoj.

— He, sinjoro! — laŭtvoĉe turniĝis la komercisto al sia frumatena gasto. — Vi bonvolas esti instruisto ĉi tie, ĉu ne? Bonege! Sed ĉu vi scias, kiom necesas por la enoficigo? (Li deziris diri „kiom da levoj“.)

— Ho, jes — vigle respondis Estontov. — Infanaron mi instruos kaj krome... mi intencas dissemi klerecon ankaŭ por viaj vilaĝanoj.

— Kion vi diraĉas? Kle-re-con?! Aŭdu bone, mia kara. Se vi volas esti instruisto en tiu ĉi vilaĝo, prizorgu nur vian instruistan laboron. Kapabligu la infanojn ellerni la alfabeton kaj la multipliktabelon, instru ilin, kiamaniere oni subskribas polison. Nenio plia necesas! Ĉu klare? Nenia klareco por tiuj sovaĝaj vilaĝanoj, nenia kontakto kun diversaj kontraŭŝtataj elementoj! Jes! Kaj... krom tio... post la ricevo de la unua salajro nepre vizitu min...

Estontov naĝis jam en maro de tute novaj pensoj. Aŭdinte „vi estas libera“, li ektemis kaj kun kontento foriris, likvidante sian unuan renkonton kun la „vivo“.

Iun belan vintran dimanĉon la vilaĝana popolo Stavri malplezure anoncis al sia preĝantaro, ke post la liturgio „en la lernejo tiu nova instruisto prelegos pri io“.

Ĝis nun multaj oratoroj alvenadis en la vilaĝon. Nur okaze de balotoj. Paroladis, promesadis. Reveninte la urbon, ili ĉion forgesis. Nun la afero estas tute alia: prelegos ne urba oratoro, sed nia propra kleriganto. Nu, ni iru, fratoj, por aŭdi kion li diros!

Kaj la tuta ĉambreto rapide pleniĝis.

* Hodiaŭ la esperantistoj en Burgas kaj al distrikto alte tenas la standardon de paco kaj amikeco inter la popoloj. Per sia agado ili aktive kontribuas por la diskonigo de la socialisma konstruado en la distrikto kaj de niaj belegaj nigramaraj ripozejoj.

Nikola Vâlkanov

prezidanto de E-societo „Nigra Maro“,
Burgas

El ĵ. „Ĉernomorski Front“
n-ro 7285/1970 — mallongigita



— Karaj miaj samvilaĝanoj! . . .

La vortoj tondras inter la malaltaj muroj, eĥas en la oreloj kaj naskas esperojn, nevekitajn ĝis nun. La avinoj, enŝovintaj fingron en la buŝon, flustras unu al alia: „Kiel saĝe li parolas, ŝajne el Biblio legas.“

— Ĉu tiel devas esti? — tondras la oratoro. — La infanoj vizitas la lernejon malsataj. La patroj laboras senripoze, ricevas mizerajn enspezojn kaj fordrinkas ilin en la drinkejo de baj Koljo. Ĝis kiam? Ĉu ankaŭ ni devas peti feliĉon de dio, kiel niaj malkleraj pravaĵoj. Ni vivas en nova epoko. Ni devas . . .

— Sufiĉeeee! Ĉu vi aŭdis, homoj? Apenaŭ nun mi komprenas liajn vortojn en mia drinkejo, kiam li alvenis peti oficigon. Klare!

— Li estas ateistooo! — ekkriegis popo Stavri. — Kaj krome, ĉu vi scias, fratoj kaj fratinoj, kion signifas tiu „ispiranto“? Lingvo de la diablaj bolŝevistoj. Jen kian lingvon li predikas al la junularo. Forpelu lin!

— Jes, klare, kontraŭŝtata elemento. Ĉesigu vian paroladon, instruisto! — jam ordonon donis la vilaĝestro.

Trista sunsubiro super Jantra. Jam denove, sed reire, flegme grimpas veturilo sur la vojo laŭrivera. Tro malpeza estas la ŝarĝo: fojno por la ĉevaleto, avo Dimo kun la pipo. Krome — instruisto kun kofro kaj en la kofro — kajero kun nefinita parolado.

Furiozas vintra vento. Flugas, falas la neĝeroj, kovras vojon, kofron, koron, nefinitan paroladon.

Vi esperu, paciencu, mia kara pasaĝero! Pli feliĉa tempo venos, kiam saĝaj, junaj homoj ĝuste kiel vi necesos . . .

Hr. M. Volin

Atentu! Esperantistoj, instruistoj, pioniroj!

Ankaŭ en tiu ĉi jaro — meze de julio — okazos Internacia Tendumado de esperantistoj-pioniroj (infanoj 10—15-jaraj) en Balatonfenyves apud la lago Balaton. La tendumado daŭros 2 semajnojn. La partoprenkotizo estas 700 forintoj kaj inkluzivas la tranoktadon, manĝadon (4-foje tage), ekskursojn, lingvokurson. Estos akceptitaj nur infanoj. pri kies lingvokono atestas ilia instruisto.

Celo: feriigi diversnaciajn infanojn, interamikigi ilin pere de Esperanto, evoluigi ilian lingvoposedon sub la gvido de E-instruistoj.

Limdato de la aliĝo: la 15-an de majo 1971.

Pliajn informojn petu de: Organiza Komitato de 4-a Internacia Tendumado de Esperantistaj Pioniroj, Pécs 1. Pf. 2., Hungario.

La 3-an de februaro j. k. forpasis en Asenovgrad en sia 67-jara aĝo la malnova kaj tre agema esperantisto

ATANAS G. MARKOV

Li lernis Esperanton en sia junaĝo kaj dum sia tuta vivo estis ĝia sindona propagandanto. Estante bona pedagogo kiel popola instruisto, k-do Markov gvidis multajn E-kursojn. Li estis unu el la organizantoj de la 29 Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj en Asenovgrad (1946) K-do Markov partoprenis la kontraŭfaŝisman batalon, laboris aktive ankaŭ kiel abstinulo ka kooperativano. Li estis kativa membro de Esperanto-societo „David Sasonov“.

Niajn kondolencojn al liaj familianoj kaj geamikoj en Asenovgrad!

Ĉefredaktoro: Kunĉo VÁLEV

Redakta Komitato: Bojka BATALSKA, Asen GRIGOROV, Tatjana EVSTRATIEVA, Stefka HRISTOVA, Ivan SARAFOV, Simeon D. SIMEONOV.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 83-26-82

DEZIRAS KORESPONDI

Ĉeĥoslovakio

Ladislav Cibur — Vyčapy 54, p. Vrdy, o. Kutná Hora — instruisto de desegnado, deziras kontakti kun kolegoj por interŝanĝi infandeseĝnaĵojn kaj objektojn ellaboritajn de liaj gelnantoj 11—15-jaraj).

Pollando

Bożena Balanda — 18-jara lernantino, W albrzych, ul. Lenina 38/4, woj. Wrocław (pri muziko, filmoj, geografio, turismo).

Danuta Lawistowska — 19-jara, ul. Rypin-ska 2/1, Bydgoszcz (literaturo, historio, geografio, turismo, junularaj problemoj, filmoj).

Tadeusz Kosieradski — 20-jara, fraŭlo, elektroteknikisto, ul. Ciasna 12 m. 7, W arszawa (Malnova Urbo) dez. korespondi kun junaj bulgaroj pri sporto, turismo, literaturo.

Grazyna Zytkevicz — lernantino, ul. Ozopkowska 53, Łodz 7 — kun ĉi pri ĉi.

Krystyna Dziecielska — lernantino, ul. Uminskiego 5/43, Łodz 58 — kun ĉi pri ĉi.

Sovetunio

Fedulina Galja — 17-jara, str. Sovetskaja 42, loĝejo 53, Ivaŝovo.

Zahart Nikolaj — 15-jara lernanto, str. Sovetskaja 42, loĝejo 1, Ivaŝovo.

Nesupranina Sveta — 16-jara, ul. 2-a Polevaja 40/35, Ivaŝovo 35.

Tolstih Ljubov Aleksandrovna — 26-jara, geodezisto, str. Komsomolskaja 46, Blagovješĉensk, Amurskaja obl. (preferas temojn pri kinoarto, arto de XVI—XVIII jarcentoj k. a.).

Sergej Demiĉev — 25-jara, oficisto, pl. Lenina 9/2 — 42, Monĉegorsk, Murmanskaja obl. — pri filatelo, turismo, kosmonaŭtiko.

Lernantoj en mezlernejo (15—19-jaraj) kaj instruistoj — kun ĉi pri ĉi. Adreso: Esperanto-Ring, 10, Keskool, Tallinn 16, Estonio, USSR.

Esperanto-klaso, Jogeva, Keskool, Estonio, USSR — kun ĉi pri paco, amikeco, infana vivo, ludoj, E-lernado.

Kultuurimaja Esperantoring, Haapsalu, Estonio, USSR — diversaĝaj esperantistoj — kun ĉi pri ĉi.

Esperanto-sekcio de Pedagogoj, Tallinn 1, p. k. 134, Estonio, USSR — dez. kor. kun pedagogoj kaj edukistoj el ĉi pri fakaj temoj kaj pri E-instruado.

Esperanto grupo de muzikistoj, Konservatorio, Tallinn 1, Estonio, USSR — deziras kontaktojn kun muzikistoj kaj E-grupoj ĉe konservatorioj tutmonde.

Asta Kulep — 28-jara fraŭlino, instruistino de angla, rusa kaj estona lingvoj, Valdeku 9—2, Tallinn-16, Estonio USSR — kun ĉi pri ĉi.

La Esperanto-klubo en Zaporĵje ege bezonas E-afiŝojn (pri E-kongresoj, festivaloj k. a.), presitajn sloganojn, opiniojn de famaj homoj pri Esperanto k. s. en nacilingvoj kaj Esperanto por ornamo de sia klubejo. La membroj de la klubo deziras korespondi kun ĉi pri ĉi. Sendu materialojn kaj leterojn al: Esperanto-klubo, pr. Lenina 159, Zaporĵje-33, Ukrainio, USSR.

USA

Paul J. Lareau — 29-jara, librovendisto, 1032 Orchard Street, Toledo, Ohio 43609 (genologio, pacmovado, internaciaj problemoj).

TRA LA GAZETARO

En ĵ. „Providiŝki Glas“ (30. XI. 1970) — informo, ke la 13-an de novembro 1970 komenciĝis kurso de Esperanto. La kurson gvidas Gerĉo Ĝambazov.

En ĵ. „Ĉernomorski Front“ —Burgas (2. X. 1970) aperis longa artikolo „La Esperantomovado en la regiono de Burgas“ de Nikola Vălkov, kiun ni publikigas en n-ro 3 de „BE“.

En la sama ĵurnalo (17. X. 1970) aperis detala informo pri la forestaj E-kursoj, kiujn organizas la Sofia DK kaj la Instruista Sekcio de BEA.

En ĵ. „Ĥaskovska Tribuna“ (16. XII. 1970) — informo de Ĵeko Zaprianov pri la inda honorigo de d-ro L. L. Zamenhof konekse kun la 111-a datreveno de lia naskiĝo, kiun organizis la esperantistoj en Dimitrograd.

En ĵ. „Rabotniĉesko Delo“ (23. XII. 1970) en la artikolo „Gloraj Jubileo“ de Petr Georgiev, dediĉita al la 70-jara jubileo de la fondiĝo de la progresema laborista fizikkultura movado kaj de la gimnasta societo „Borec“ („Batalanto“) la aŭtoro mencias ankaŭ la Sportan Klubon „Esperanto“.

En ĵ. „Dobruĝanska Tribuna“ (29. XII. 1970) — informo de Ivan Ganĉev pri la solena vespero kun riĉa literatur-muzika programo en Tolbuhin, dediĉita al Zamenhof konekse kun la 111-a datreveno de lia naskiĝo.

En ĵ. „Trojanski Glas“ (6. I. 1971) — artikolo — „Esperanto, paco kaj amikeco“ de Vasil Mitovski. La aŭtoro tuŝas koncize la historion de la movado en Trojan.

En ĵ. „Pirinsko Delo“ (9. I. 1971) — artikolo „Esperanto — lingvo de la paco“ de Georgi Markov. La aŭtoro rakontas pri la signifo de Esperanto kaj pri la traduko de gravaj verkoj el la socialisma kaj bulgara literaturo.

